

Vojaĝo al Kazohinio de Sándor Szathmári : En Kazohinio
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 775, 1978.08.17 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La tri pasintajn seinajnojn ni konatiĝis kun la vivo Sándor Szathmári kaj pri la literatura graveco de lia verko: "Vojaĝo al Kazohinio", tio laŭ studo de Mária Bereczki, studentino ĉe la universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto. Hodiaŭ ni iom vojaĝos en Kazohinio, sed unue ni devas memori, ke Kazohinio signifas 'la lando de la homoj, kiuj konas la puran esencon de la homa estado, de la homoj, kiuj vivas racie'. Kazoo estas matematika klereco, kiu forigis ĉian neraciecon kaj sentimentecon el la homa cerbo. En Kazohinio ekzistas tri homklasoj, tiu de la racie kleraj homoj, tio estas la hinoj, tiu de la nekleraj homoj, tio estas la behinoj, inter ili troviĝas la infanoj, kaj fine tiu de la homoj, kiuj neracie kondutas, kiuj nekezo kondutas. Ili estas nehomoj, tio estas behinoj. Ilin oni forpelas en rezervejojn.

A.- Kun Gulivero ni esploru kazohinion. La unua parto de "Vojaĝo en Kazohinio" prezentas la vivon de la hinoj. Pluraj kritikistoj pensis, ke la unua parto de la sciencfikcia romano de Sándor Szathmári estas seninteresa, kaj ke la dua parto, en kiu la aŭtoro kun akra satiro kritikis kaj primokas la stultecon de la behinoj, estas pli interesa, pli vivplena ol la unua. Fakte Szathmári volis montri, ke ĉe la hinoj nenio moviĝas, ke ĉio fakte eternas en science konstruita socio. Sed ĉe la behinoj, kien Gulivero iras vivi, kiam la hina vivo fariĝis al li netolerebla, la vivo estas aventurplena, movoplenta, timoplenta, konfliktoplenta.

Cl.- Por Sándor Szathmári la homaro staras antaŭ du alternativoj: ĉu la vivo de la hinoj, ĉu tiu de la behinoj: ĉu vivo regata de la tekniko, ĉu vivo regata de la sentimentoj.

A.- La hinoj ne konas la monon. Neniu ricevas salajron. La varoj kuŝas en magazenoj memservaj, el kiuj ĉiu forportas tiom multe, kiom li volas. Gulivero diras :

Cl.- "Mi povas aserti, ke por miaj eŭropaj okuloj estas tre strange vidi tian socion, kies ĉiu membro estas riĉa, ne havanta unu pencon. Kvazaŭ la tuta socio estus unu familio sen financaj problemoj, sen skribitaj reguloj, sen limita teritorio, sen zorgoj pri la postenoj, ktp."

A.- La hinoj ne navas historion. Ĉiu rememoras nur la tempon mem-travivitan. El la prauloj postrestas por la idoj nenio krom iliaj kreaĵoj: ia nova kemia procedo, konstruaĵo, maŝino, sed pri ties eltrovinto nenio interesiĝas. En Kazohinio la vivo ne okazas, sed simple estas. La hinoj ne bezonas ekonomian sociordon, filozofion, leĝaron, ŝtatan administradon, religion kaj beletristikon. Ĉio tio ne plu povas ekzisti en lando, kie ĉiu iras laŭ propra vojo obeante al la principo de la kazoo, de la scienca racieco.

Cl.- Por Gulivero tiu modele racia mondo estas neeltenebla. Ni citu lin :

A.- "Ĉi tie nenio okazis. Ne estis amiko, malamiko, ĝojo, malĝojo, rango, riĉulo, malriĉulo, kreado, progreso, do per unu vorto: varieco. Ni diru jene: vivo. Ĉar kio alia estas la vivo, ol diferenco inter la hieraŭo kaj hodiaŭo, kiam oni atendas ion de la morgaŭo. La ekhalto kaj stagno estas morto. Mi estis tute sola. Nek en la laborejo, nek sur la stratoj iu min alparolis. Mi kuradis tien-reen, kiel la sovaĝa besto, fermita en kaĝo, serĉante vivon, aeron. Mi staris tie, en la plej granda karcero, ĉar vane mi estis libera, se la aero ne estis libera ĉirkaŭ mi. Mi velkadis senamike, palplene, en la lando de la nenio."

Cl.- La hinoj nure vivas. Gulivero venis el mondo, kie oni vivas por lukti, kie oni mortas por la religio, por la standardo, por la amo, por la belo. Por la hinoj ĉio tio estas nur vortoj, kaj vortojn nenecesajn ili eĉ ne prononcas. Gulivero ne povis plu vivi inter la hinoj kaj li deklaris, ke li sentas sin en tute "senespera" stato kaj postulis, ke li estu portota inter ia behinojn, tio estas la nehomoj por la hinoj.

A.- En la dua parto de la romano ni vivas kun Gulivero en behina kolonio. La behina socio estas fakte groteska spegubildo de nia nuna socio. Ĉi tiu satiro kritikas la absurdaĵojn de la homa socio ĝenerale. Kaj ankaŭ inter la behinoj Gulivero estos fine malfeliĉa.

Cl.- La forton de la akra satiro plialtigas tiu fakto, ke la absurdaĵojn de la homa socio la aŭtoro ne grandigas. Li simple starigas ilin en nekutiman lokon. Ekzemple samkarakteraj vivfunkcioj estas interŝanĝitaj. Ĉe la behinoj la manĝadon oni traktas, kvazaŭ ĝi estus seksa agado.

A.- La behinoj havas tabuojn, ĝentilecon, modojn, kutimojn kaj multajn vortojn, kies signifon neniu povas klarigi. Jen parto de interparolado, kiun Gulivero havas kun behino:

Cl.- "Se oni diras "pricc-prucc" vi devas reairi tion kaj meti vian fingron sur vian nazon, kaj tio estas la belki. Kaj la belki estas ketni. Se vi ne faros tion, vi ne kondukas ketni-maniere, kaj oni kompreneble enoos pri vi.

A.- Kaj se mi diras "pricc-prucc"?

Cl.- Tiam oni ridetas kaj gratas viati postaĵon, post kio vi regratas lian. Tio signifas, ke vi ambaŭ ne enoas unu pro la alia kaj vi ambaŭ estas ketniaj homoj.

A.- Gulivero fine travivas la furioziĝon, kiu estas nomita bukua. Ni citu :

Cl.- Vi ekprenas tiun – kaj li enmanigis la mittranĉilon - vi venas kun mi al la monteta deklivo, kaj tie vi certigas la pacon kaj civilizacion.

A.- Kiel?

Cl.- Ke vi pikas la kemonulojn kaj ili pikas vin.

A.- Post kelkminuta marŝado ekaperis la monteto, kaj tuj frostiĝis la sango en la Guliveraj vejnoj pro la ekvidita teruraĵo. Surmonte la konanoj kaj kemonanoj tranĉilsvinge kaj ŝaŭmbuŝe kuregis unu al la alia, kaj baldaŭ dolorigis liajn orelojn la sovaĝbesta hurlado de la furiozuloj el la tuta frenezulejo. La malsanuloj senbride piedbatis, ŝiris, pikis kaj tranĉis unu la alian, kaj neniu ekzistis por haltigi la buĉadon!

Cl.- Por Sándor Szathmári la hodiaŭa homaro staras antaŭ alternativo: Ĉu ĝi hiniĝos? Ĉu ĝi behiniĝos? Aŭ, ĉu eble ĝi malkovros alian vojon? Meditiga romano, kiun la esperantistaro devus fine eklegi.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!